Heinrich Heine,

# Frühlingsbotschaft

Leise zieht durch mein Gemüt
Liebliches Geläute
Klinge, kleines Frühlingslied,
Kling hinaus ins Weite.

Kling hinaus, bis an das Haus,
Wo die Blumen sprießen,
Wenn du eine Rose schaust,
Sag, ich laß sie grüßen.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* HEINRICH HEINE *(∗1797-12-13 – †1856-02-17).*

*Arg-527-1043 (2010-03-14 15:54:47)*

*Tiu ĉi poemo troviĝas interalie ankaŭ en la reta kolekto "Gutenberg.Spiegel" sub* `http://gutenberg.spiegel.de/?id=5&xid=1136&kapitel=10&cHash=3da378c6dbfruehlin#gb_found`.

Heinrich Heine,

# Softe vibras tra l'anim'

*tradukita de Kálmán Kalocsay*

Softe vibras tra l'anim'
melodi' tenera,
flugu al la malproksim',
kanto primavera!

Flugu al florbeda dom',
kaj se tie ĉarme
ridos roz', en mia nom'
ŝin salutu varme.

*Traduko de la Germana poemo "Frühlingsbotschaft" de* HEINRICH HEINE *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* KÁLMÁN KALOCSAY *(Kalmano Kaloĉajo, ∗1911 – †1976).*

*Arg-527-1088 (2010-05-27 11:29:19)*

*El la poezia volumo "Kanzonoj de Heine".*

Heinrich Heine,

# Milde fluas tra la kor'

*tradukita de Valentin Melnikov*

Milde fluas tra la kor'
kanto primavera.
Flugu, melodi-sonor',
en la vast' aera.

Flugu longe, sen ripoz',
super domoj flutu.
Se troviĝos tie roz' –
ĝin de mi salutu.

*Traduko de la Germana poemo "Frühlingsbotschaft" de* HEINRICH HEINE *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de Valentin Melnikov.*

*Arg-527-1044 (2010-03-15 17:53:18)*

*Tiu ĉi poem-esperantigo estas - kun permeso de s-ro Valentin Melnikov - prenita el ties reta kolekto* `http://www.esperanto-mv.pp.ru/Melnikov` *. Vidu:* `http://www.esperanto-mv.pp.ru/Melnikov/Heine.html` *. Vidu ankaŭ:* `http://www.esperanto.mv.ru/Melnikov/index.html` .